

Mallonga Manifesto de DiEM25

--

**La Eŭropa Unio demokratiigos
aŭ ĝi diseriigos!**

▶▶ DiEM25

La Eŭropa Unio demokratiigos aŭ
ĝi diseriigos!

MANIFESTO POR DEMOKRATIIGI EŬROPON.

Malgraŭ ĉiuj iliaj zorgoj pri tutmonda konkuremeco, migrado kaj terorismo, nur unusola antaŭvidaĵo vere timegigas la Potencojn de Eŭropo: la Demokratio!

Ili parolas en la nomo de la demokratio sed nur por ĝin negi, ekzorci kaj subpremi praktike.

Ili serĉas vojon por koopti, eviti, korupti, uzurpi kaj manipuli la demokration por rompi ĝian energion kaj haltigi ĝiajn eblecojn. Ĉar regado per la eŭropaj popoloj, registaro per la plebanaro, estas ilia koŝmaro.

La Eŭropa Unio povus esti la proverba Gvidfajro sur la Monteto, montranta al la mondo kiel la pacon kaj solidarecon oni povus kapti el la faŭko de jarcentdaŭra konflikto kaj bigoteco. Ve, hodiaŭ komuna burokratismo kaj komuna valuto disigas eŭropajn popolojn, kiuj komencis unuiĝi malgraŭ niaj diversaj lingvoj kaj kulturoj.

Nun, hodiaŭ, Eŭropanoj sentas sin malsubtenataj de EU-aj institucioj ĉie. De Helsinko ĝis Lisbono, de Dublino ĝis Kreto, de Lepsiko ĝis Aberdeno. **Drasta elekto rapide alproksimiĝas: la elekto inter aŭtenta demokratio kaj insida diseriĝo.**

Ĉe la koro de nia disiĝanta Eŭropa Unio kuŝas kulpa mensogo: ege politika, desupra, maltravidebla, decidfaranta procedo prezentiĝas kiel 'nepolitika', 'teknika', 'neŭtrala'. Ĝia celo estas malebligi al Eŭropanoj ekzerci demokratian regadon je ilia mono, komunumoj, laborkondiĉoj kaj medio.

La prezo de tiu ĉi trompado ne estas nur la fino de demokratio sed ankaŭ la revo de kunhavebla prospero:

La eŭrozonajn ekonomiojn oni marŝigas de sur la klifa rando de konkura aŭstereco, kaŭzante senĉesan recesion en la malpli fortaj landoj kaj malaltan investadon en la kernaj landoj.

Anaj ŝtatoj de la Eŭropa Unio ekster la Eŭrozonon estas fremdigitaj, serĉantaj inspiron kaj asociojn en suspektaj kvartaloj.

Senprecedenta malegaleco, malpliiĝanta espero kaj mizantropopeco floras tra la tuta Eŭropo.

Ju pli ili sufokas la demokration, des malpli laŭrajta iĝas ilia politika aŭtoritato, des pli fortaj iĝas la potencoj de ekonomia recesio, kaj des pli granda iĝas la bezono de plua estrarismo. Tiel la malamikoj de la demokratio rikoltas renovigitan potencon dum ili perdas laŭrajtecon kaj limigas esperon kaj prosperon al la tre malmultaj (kiuj povas nur ĝui ĝin malantaŭ la pordegoj kaj la bariloj, kiujn ili bezonas por ŝirmi sin de la cetero de la socio).

Tiu ĉi estas la nevidata procedo, per kiu la eŭropa krizo turnas niajn popolojn internen, unu kontraŭ la alia, plilaŭtigante jam ekzistantajn ŝovinismojn, ksenofobio. La privatigo de anksio, la timo de la aliulo, la naciigo de ambicio, kaj la re-naciigo de politiko minacas estigi toksan diseriĝon de komunaj interesoj, de kiu Eŭropo povas nur suferi.

La kompatinda reago de Eŭropo al siaj bankaj kaj ŝuldaj krizoj, al la krizo de rifuĝantoj, al la bezono por kohera eksterlanda, enmigra kaj kontraŭterorisma politiko, tiuj ĉiuj estas ekzemploj de kio okazas, kiam solidareco perdas sian signifon.

Du teruregaj eblecoj dominas:

retrofuĝi en la kokonon de niaj naciaj ŝtatoj;
kapitulaci al la brusela sendemokratia zono.

Devas esti alia vojo. Kaj jen!

Ĝi estas tio, kion oficiala 'Eŭropo' rezistas per ĉiu tendeno de sia ordonema mensosinteno: ondego de demokratio!

La frazo de Edmund Burke aplikiĝas al hodiaŭa Eŭropo perfekte: 'La sola afero necesa por la triumfo de la malbono estas, ke bonuloj nenion faras.' Ĝisostaj demokratoj devas decidi agi tra Eŭropo. Kun intenco alvoki ĝuste tian ondegon, ni kunvenas la 9-an de februaro en Berlino por fondi movadon, DiEM25.

Ni venas de ĉiu parto de Eŭropo kaj estas unuigitaj pere de diversaj kulturoj, lingvoj, akĉentoj, partiaj apartenoj, ideologioj, haŭtkoloroj, seksaj identigejoj, religioj kaj konceptoj pri la bona socio.

Ni kunvenas kiel dediĉitaj eŭropanoj decidintaj malebligi tion, ke senidea EU-a establaĵo, kiu profunde malestimas la demokration, povas malebligi veran demokratian Eŭropan Union.

Unusola simpla ideo estas la motiviga forto malantaŭ DiEM25:

Demokratiigu Eŭropon!

La Eŭropa Unio demokratiigos aŭ ĝi diseriigos!

Nia tujaj prioritatoj estas (A) plena travidebleco en decidado kaj (B) la urĝa redisponigo de ekzistantaj EU-aj institucioj en serĉo por iniciatemaj politikoj, kiuj sincere traktas la krizojn de ŝuldo, bankoj, neadekvata investado, altiĝanta malriĉeco kaj migrado. (Listero (A) inkluzivas, ekzemple: tujelsendado de kunvenoj de la Eŭropa Konsilantaro, Ecofin kaj la Eŭrogrupo, plena malkaŝado de dokumentoj pri komercaj traktatoj, publikigo de protokoloj de la ECB.)

Nia mezestonta celo, tuj post kiam la krizoj de Eŭropo jam estos stabiligitaj, estas kunveniigi konstitucian asembleon, kie eŭropanoj interkonsiliĝos pri kiel naski, antaŭ 2025, plenplenan eŭropan demokration, kun suverena parlamento, kiu respektu nacian memdecidadon kaj kunhavigu potencon kun naciaj parlamentoj, regionaj asembleoj kaj enurbaj konsilantaroj.

Ni alvokas niajn eŭropajn kunulojn, ke ili ligiĝu tuj kun ni por krei DiEM25 kaj kunbatali por demokratiigi la Eŭropan Union, ĉesigi la redukton de ĉiuj rilatoj en rilatojn de potenco maskitajn kiel nurajn teknikajn decidojn; submeti la EU-an burokratismon al la volo de suverenaj eŭropaj popoloj; kaj re-politikigi la regulojn, kiuj regas niajn unuopan merkaton kaj komunan valuton.

Ni estas inspirataj per Eŭropo de racio, libereco, toleremo kaj imago, ebligita per ampleksa travidebleco, vera solidareco kaj aŭtenta demokratio. Ni aspiras al:

- Demokratia Eŭropo, en kiu ĉiu politika aŭtoritato devenas de Eŭropaj suverenaj popoloj
- Travidebla Eŭropo, kie ĉiu decidfarado okazas sub kontrolo de civitanoj
- Uniigita Eŭropo, kies civitanoj havas tiom komune inter landoj kiom interne de landoj
- Realisma Eŭropo, kiu sin donas la taskon de radikalaj, sed atingeblaj demokratiaj reformoj
- Malcentrigita Eŭropo, kiu uzas centran potencon por maksimumigi demokration loke
- Pluralisma Eŭropo de regionoj, etnoj, religioj, nacioj, lingvoj kaj kulturoj
- Egalrajta Eŭropo, kiu celebras diversecon kaj ĉesigas ĉiujn formojn de diskriminacio
- Klera Eŭropo, kiu jungumas la kulturan diversecon de siaj popoloj
- Socia Eŭropo, kiu agnoskas liberecon sen ekspluatado kiel kondiĉon por vera libereco
- Produktema Eŭropo, kiu direktas investadon en kunhavatan, verdan prosperon
- Daŭripova Eŭropo, kiu vivas interne de la plenedaj resursoj
- Ekologiisma Eŭropo, okupata en sincera tutmonda verda transiĝo
- Kreema Eŭropo, kiu liberigas la novpensemajn povojn de la civitanara imago
- Teknologia Eŭropo, premante novajn teknologiojn en la servo de solidareco
- Historio-memoranta Eŭropo, kiu serĉas helan estonton sen kaŝi sian pasintecon
- Internaciisma Eŭropo, kiu traktas ne-eŭropanojn kiel intenculojn ne rimedojn
- Paca Eŭropo, kiu reduktas streĉojn en sia najbarejo kaj pli fore
- Malfermita Eŭropo, kiu estas vigla pri ideoj, homoj kaj inspiro de ie ajn en la mondo, agnoskante barilojn kaj landlimojn kiel indikojn de malforto kaj fontojn de malsekureco
- Liberigita Eŭropo, kie privilegio, antaŭjuĝo, senigo kaj la minaco de perforto velkas, permesante, ke eŭropanoj povu naski en malpli stereotipajn rolojn, ĝui justajn ŝancojn por disvolvi siajn kapablojn, kaj esti liberaj elekti pli da siaj gekunuloj en la vivo, laboro kaj socio.

Carpe DiEM25!

diem25.org